

asekur-kompanio organizas por siaj klientoj seancojn de dinamika rilaksado, pri kiu ĝi taksas la profiton – de 27% ĝis 48% de la sanelspezoj kutime repagitaj. Ni aldonu vorton pri **pedagogio**: la Hispana d-ro *Mariano ESPINOSA AROCA*, kiu pristudis kaj alĝustigis audio-vidan teĥnikon, estis rekompencita per la aljuĝo de ora medalo pro sia metodo de pedosofrologio en la Monda Kongreso de Pediatro, ĉe kiu en 1974 kunvenis 8000 fakuloj en Buenos-Ajreso. Por fini ni revenu ankoraŭfoje al **medicino** por diri, ke la Sendolora Akuŝo, kiu aperis en Francio ĉe la komenco de la 50aj jaroj jam konsistis el sofrologio antaŭ la litero. Ni asertis, ke sofrologio estas antaŭ ĉio scienco kaj terapeutiko. Ĝi ankau estas vivmaniero por la sofrologo. Ĝi ankau estas filozofio kaj vivarto: ĝi ebligas al ĉiu, post forigo de tiuj etaj blokadoj, kiujn ĉiu trovas en siaj bagaĝoj, plene dispetaliĝi en la vivo, fari plian paŝon en la direkto de tiu "pli abunda vivo", pri kiu Kristo aludis. Fakte ĉiu faros el la sofrologio tion, pri kio li kapablos: ĝi estas teĥniko inter aliaj. Cetere oni ne preteratentu, ke la cerbo estas informatika kaj kibernetika instrumento kun mirindaj kapabloj: nu, la moderna homo uzas el ĝi nur apenau la dekonon...

## Bibliografio

- ABREZOL Raymond. *Sophrologie dans notre civilisation*. Inter Marketing Group : Neuchâtel, 1973, 382 p.
- ABREZOL Raymond. *Sophrologie et sports*. Chiron Sports. Collection APS, 1985.
- BOON H., DAVROU Y., MACQUET J.-C. *La sophrologie, une révolution en psychologie, pédagogie, médecine?* Retz, CEPL : Paris, 1976, 256 p.
- CAYCEDO Alfonso. *Progrès en sophrologie*. (Trad. el la Hispana: *Progresos en Sofrologia*. Société centrale de sophrologie et de médecine psychosomatique. Barcelone, 1969, 411 p.
- CAYCEDO Alfonso. *L'aventure de la sophrologie*. (Red. Yves DAVROU). Retz : Paris 1979, 205 p.
- GUIRAO Miguël. *Anatomie de la conscience, Anatomie sophrologique*. (Trad. el la Hispana: *Dr. Jeanne CREFF, Paris : Anatomia de la consciencia, Anatomia sofrológica*.- Prefaco de Dr. A. CAYCEDO), Maloine : Paris, 1979, 272 p.
- RAGER G.R. *Hypnose, sophrologie et médecine*. Fayard : Paris, 1973, 582 p.
- SCHULTZ J.H. *Das Autogene Training (Konzentrierte Selbstentspannung)*. Thieme : Stuttgart, 1960

## Adreso de la aŭtoro

D-ro André ALBAULT  
21, rue de Verfeil  
FR – 31200 Toulouse / FRANCIO

## Pri aŭtoro informo

D-ro Albault, iama prezidanto de la Akademio de Esperanto, iama Estrarano de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj ties honora membro estas emerita kuracisto oftalmologo, diplomita instruisto de sofrologio (Barcelono, 1985) kaj skolano de d-ro Caycedo.

## Recenzo

### Pri la nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto SAT 2002 (NPIV)

Marcel LEEREVELD

Por verki ĉi tiun recenzon mi studis la enhavon de la mezalfabetaj literoj l kaj m, por havi mezan juĝon. Mi kompreneble ankaŭ legis la enkondukon, kaj inkluzivigis kelkajn iliajn partojn en mia juĝo. Menciante la antaŭan "Plenan Ilustritan Vortaron kun Suplemento" (PIV) mi inkluzivigis la 1987-an Suplementon. Kie ambaŭ eldonoj samas, kio estas grandparte la kazo, mi tre malofte konsideris (kvankam legis) la tekston kritike: por samtempe recenzi la malnovan PIV-on mi bezonus multe pli da tempo kaj da papero, kaj ankaŭ da kritikado. Sendube la 1970-a PIV jam sufiĉe vaste laŭdatis kaj kritikatis, de aliaj.

## La teĥnika parto

Ĉar la tuta libro enhavas ±1250 paĝojn (antaŭe ±1290), miaj 125 paĝoj recenzitaj formas la dekonon. Por havi recenzon pri la tuta libro, oni do dekobligu miajn laŭdojn, laŭdetojn, kritiketojn, kaj kritikojn. Cetere la pezo de la malnova PIV estis 1.3 kg, de la nova 1.6 kg. La litertipoj estas preskaŭ samgrandaj, sed la paĝoj de NPIV estas iom pli grandaj kaj ilia presita surfaco estas konsiderinde pli granda. Pro tio la plia enhavo. Malagrabla kaj kelkfoje konfuze la litero i nefacile distingeblas for de la litero l.

En naciaj lingvoj, ŝanĝiĝemaj ja, la celo de la vortaro estas simple registri la lingvon uzatan kaj registri ĝian ŝanĝiĝadon laŭ signifoj, laŭ neologismoj, kaj, malpli, laŭ ortografio kaj laŭ prononcado. Ĉar la ekzistorajto kaj celo de Esperanto estas malsamaj, kvankam ne malpli vastaj, ĝi klare devas montri la neŝanĝeblan Fundamenton (inkl. la oficialigitajn vortojn) for de la neologismoj, por ke konsciencaj Esperantistoj povu kiomeble uzi la oficialajn vortojn, por ke ili trovu Fundamentecajn alternativojn, kaj por ke ĉiu uzanto de la vortaro klare

konsciu, ke neoficialaj vortoj, t.n. neologismoj, estas nur proponoj, ne de la Vortaro, sed de iu ajn persono – kaj ofte du aŭ tri malsamaj por la sama signifo. Ĉiu Esperantisto rajtas proponi, do uzi, malsamajn aŭ pliajn neologismojn. La tasko de bona Esperanto-Vortaro estas, klare diferencigi la du grupojn kaj krome doni oficialajn alternativojn (kunmetitajn, kie tio eblas) por la neologismoj. NPIV, (same kiel la malnova), ne faras tion: por diferencigi utilas nur uzi malpli grandan litertipon por la neologismoj ol por la oficialaj; krome Fundamenteajn alternativojn ĝi malofte donas. En ĉi tiu senco la libro estas danĝera, ĉar la karaj sed sklavemaj samideanoj simple kaj senkritike, prenas iun ajn vorton el NPIV por uzi ĝin ("Oh, ĝi estas en PIV, do ĝi estas uzbla!")

Alia, kvankam multe malpli grava, kritiko mia estas ĝia malamo ante la belan kaj utilan literon ĥ, ŝanĝanta ĝin al k, kiel meĥaniko kaj meĥanismo, kaj Melkioro por Melĥioro. Sendube tiu tendenco estas precipe franca, kaj nekonscie kontraŭaraba, sed ĝi ĉagrenas min. Same tendenco estas la ne malofte uzo de c (anstataŭ k) por la latina c (*Licio*, ktp.).

Kompreneble en ĉiu tiom granda kaj detalema verko enŝoviĝas kelkaj preseraroj. Jen kelkaj:

- 1<sup>a</sup>. La anoncvorto "floro" supre sur paĝo 350 devas esti "fokseno";
- 2<sup>a</sup>. Majuro kaj mesentero troviĝas alfabeto en malĝustaj lokoj;
- 3<sup>a</sup>. Masaĉuseco (pli konvenus Masaĉusetso) estas alfabeto en malĝusta loko (jam en PIV, sed tie aliloke);
- 4<sup>a</sup>. ĉe "majstriĝi" (sub majstro) la klarigo "igi majstro" devas esti "iĝi majstro";
- 5<sup>a</sup>. sur paĝo 30 en la sama frazo aperas kaj "eŭropeca" kaj "ne-Eŭropaj" (cetere ol ne-eŭropaj plibonus neeŭropaj);

Tio estas tre malmultaj preseraroj en ±125 paĝoj, sendube pro la granda nombro da kontrolantaj kunlaborantoj.

### La Enhavo

La enciklopedia parto, tre grava kaj detala, estas preskaŭ perfekta, verŝajne ĉar la verkistoj povis uzi la naciajn enciklopediojn (la klarigoj ofte *Larousse*-aspektas france): mi povis trovi nur unu eraron pri mia lando: "aŭstrala" devas esti "sudhemisfera" kaj "aŭstralo" (ne la stulta "aborigeno") = indiĝeno de Aŭstralio (kun la derivado "Aŭstral-ujo" = lando de la aŭstraloj).

Kelkaj (malmultaj) klarigoj estas neklaraj:

- 1<sup>a</sup>. Ĉe large: el kiu direkto venas la vento?
- 2<sup>a</sup>. Ĉe laricio: kio estas stara arbo? Ĉu ekzistas, krom kelkaj nenormalaĵoj, ankaŭ sidaj kaj kuŝaj arboj?
- 3<sup>a</sup>. Restis la du signifoj por "lazareto". Cetere la vorto ne bezoniĝas: 1) kva-rantenejo kaj 2) soldatmalsanulejo.
- 4<sup>a</sup>. la klarigoj por li, ŝi kaj ili ne sufiĉas, ĉar tiaj ili povus reprezenti ankaŭ mi, ci, vi, kaj ni. PIV pliĝustas.
- 5<sup>a</sup>. Mankas lumpo, kaj kio estas "lumpio" = printemporulo? Espereble ne la angla *springroll* !
- 6<sup>a</sup>. Ĉu maceri bezonas likvon malvarman?
- 7<sup>a</sup>. Ĉu ungomangema ne estu ungomordema?
- 8<sup>a</sup>. Rapidmanĝejo estu mallongmanĝejo, ĉar oni manĝas mallonge, ne necese rapide.
- 9<sup>a</sup>. Kial ne marŝi-1 = marŝegi, kaj marŝi-2 marŝi, aŭ marŝi-1 = marŝi, kaj marŝi-2 = paŝi.
- 10<sup>a</sup>. Ĉe medialo mankas Esperanto.
- 11<sup>a</sup>. Kial mantilo ne estas mantiljo?
- 12<sup>a</sup>. Ĉe lumi estas menciita: = prilumi. Kial ne ĉe loĝi + pasivo la klarigo, ke loĝata estas mallongigo de enloĝata?
- 13<sup>a</sup>. Kial la sama vorto por du malsamaj plantoj: la herbo-genro *Lotus* kaj la arbo *Zizyphus*? La lasta nomiĝu almenaŭ lotuszizifo.

Pli strangaj estas la sekvaj kazoj:

- 1<sup>a</sup>. Mastro 5+6 estu (planta, besta) parazitnutranto.
- 2<sup>a</sup>. Ŝpinmastro estu mastro de la ŝpinada parto en fabriko, kaj ŝpin-industriisto estu ŝpinejmastro.
- 3<sup>a</sup>. Kial du vortoj por praktike la samaj: masturbi kaj onani?
- 4<sup>a</sup>. Mi kontestas la duan signifon de "obl": ĝi estas sama al la unua, ekz. milobla = prezentanta nombron kiu estas al la antaŭa (= unu) kiel mil al unu. Alivorte: se la kompara nombro kun mil ne estas menciita, ĝi estas unu.
- 5<sup>a</sup>. La germaneca "sin elmontri" estu "sin aspektigi", "sin montri", aŭ "montriĝi".
- 6<sup>a</sup>. Sub "multe" neĝustas diri "substantive uzata": ĝi ne estas. Ĝustas diri, kiel sub "kelke", "uzata kun la senco de substantivo"; cetere tiaj substantiv-sencaj adverboj uziĝas nur kun "da": sufiĉe da; tiom da, iomete da, plene da; ktp.
- 7<sup>a</sup>. Strangas ke la Mediteraneo ĉiam bluas kaj ke aliaj maroj neniam bluas (lazuro).
- 8<sup>a</sup>. Se la klarigo por "limusino" validas, kio estas la utilo havi la vorton (preskaŭ ĉiuj aŭtoj ja estas fermitaj)?
- 9<sup>a</sup>. Ĉe Loveno: kial ne menci, ke ĝi situas en la regno Belgio?

- 10<sup>a</sup>. "Ilmaŝino" estas maŝino por fari ilojn. La NPIVa signifo estu "kun-ila maŝino".
- 11<sup>a</sup>. Kial la vortaro bezonas pli da vortoj por fekaĵo (malmanĝaĵo, merdo)? Ĉu por "merdigi" ĝin?
- 12<sup>a</sup>. Kial oni aŭ io restas, kiam oni aŭ io falas (falmenuo)? Al mi ŝajnas la kontraŭo.
- 13<sup>a</sup>. Sub "metro": ĉeestas mikro-, mili-, centi-, deci-, kaj kilometro, sed mankas dek-, hekta-, kaj megametro.
- 14<sup>a</sup>. Ĉu la vorto "krakmanĝejo" ne estas stultaĵo?
- 15<sup>a</sup>. Kial "skerminstruisto" estas majstro, sed la aliaj sportoj evidente ne havas majstrojn?
- 16<sup>a</sup>. Se "latino" estas ano de nur unu el la latiaj gentoj, kiel ĝi povas samtempe egali al latiano?
- 17<sup>a</sup>. Por plifaciligi la laboron, oni inventis novan lingvan regulon por Esperanto, nome ke ekzistas (kaj ekzistu!) homonimoj en Esperanto (= 17-a regulo!).
- 18<sup>a</sup>. La PIV-a makaronio plibonas ol makaronioj.
- 19<sup>a</sup>. Makiso (2) = makisejo.
- 20<sup>a</sup>. La homonimo "radikalo" estu "radikelo", ĉar "radikala" jam estas oficiala.
- 21<sup>a</sup>. Estas danĝera novaĵo, trakti plurajn ĉefelementojn de kunmetaĵoj kiel sufiksojn (paĝe 35, unuakolone).
- 22<sup>a</sup>. La aŭtoroj praktike alikategoriigis plurajn radikojn, ekz. lumi al lumo.

La klarigoj kaj la ekzemploj en la nescienca parto estas ĝenerale samaj al tiuj en la malnova PIV (tio evitis serĉi milojn da ekzemploj), kun jen kaj jen mallonga aldono aŭ korekto. Sed pluraj, kvankam precipe sciencaj, kapvortoj ricevis gravan ŝanĝon aŭ aldonaĵon, ekzemple jenaj: lakso, legumo, lilio, lizo, matura (i.a. seksmatura por adolta), medio, mediano, mediumo, mejozo, melano, menso, metabolo, metamorfa, meteoro, metamorfozo, mio, mikroskopo, mineralo, mjelo, modo-2, modulo, mutacio.

Ĝenerale la verkistoj uzas, krom bonegan Esperanton, la plurajn nelogikaĵojn kaj lingvisme malĝustajn esprimojn svarmantajn en la literaturo, kiaj: vortoj kun infikso (sinmortigo anstataŭ simortigo); radikoj kun duobla sama konsonanto (Finnlando, anstataŭ Suomio); "sub kontrolo de" anstataŭ "sub regado de"; troa uzado de "da"; "ne ankoraŭ" (francismo sur paĝo 1265) anstataŭ "ankoraŭ ne"; anglo-saksa anstataŭ angla-saksa; perlabori anstataŭ porlabori; "fare de" anstataŭ "ate de"; "denove" anstataŭ "ree"; "krom" kie klaras nur

"escepte de"; tendenco al la -atismo; "disde" anstataŭ "for (el) de"; ktp.

La Ĝenerala gvidanto de NPIV enpraktigis kelkajn siajn fortajn principojn pri la gramatiko, vortkunmetado, kaj vortar-aspekto. Unu tiaj estas, klasifiki plurajn vortojn laŭ alia kategorio ol la oficiala, anstataŭ ol la Akademio decidis pri tiuj eventualaj ŝanĝoj. Laŭ mi tia agado estas nepardonebla. Unu el la rezultoj estos, ke ni ne plu scias, ĉu ekz. urino estas la radikoj aŭ mallongigo de urinaĵo el urini (ĉar la aga urino el urinado neniam uzatas). Ankaŭ lian liberecon pri transitiveco mi trovas malforta: tio estas la komenco de la disfalo de la verba sistemo en Esperanto, iomete same kiel okazas en la angla lingvo. La tialoj donitaj estas la kutimaj, ĉar oni ne komprenas, ke ekzistas du akuzativoj: unu por la objekto kaj unu kiel anstataŭanto de prepozicio.

Pro tiu nekompreneblo estus pli bone, se *Zamenhof* estus malpermesinta iun ajn elprepozician akuzativon (kun speciala indiko por movo al loko) kaj ke pasivoj de ŝajne netransitivaj verboj eblas nur se ĉeestas la prepozicia prefikso, ne ke ĉi-lastaj subkomprenatas. Ne helpas la komprenon, la neutila ideo pri valento, parte kreita de la german-latin-greka gramatika principo malĝusta, ke la centro de la frazo estas la verbo, ne la subjekto, kiu en Esperanto kaj eŭropaj lingvoj vere estas la centro. En Esperanto eĉ pli gravas tiu ĉi lasta valorigo de la determinadaj reguloj reprezentantaj la veran komunikadirekton de la bildo. Pri infiksoj: la aŭtoro diras, ke li ne akceptas sensignifan infikson en kunmetaĵoj, sed favoras "finaĵojn interne". Stranga principo! Mi plue ne samopinias pri lia (necesita) kreo de multaj homonimoj.

Sed mi ankaŭ rimarkis multajn gravetajn kaj gravajn pliboniĝojn:

- 1<sup>a</sup>. Preskaŭ ĉiuj (sed ne ĉiuj!) inaj nomoj (precipe antikvaj) ricevis la o-finaĵon anstataŭ la PIVa -a (Melizino, ktp.); *Zamenhof* fakte uzis -a nur por nomoj en -a, ne por ekz. Elizabeto;
- 2<sup>a</sup>. Ĉie uzatis "danke al" anstataŭ la malĝusta "dank' al";
- 3<sup>a</sup>. Ŝanĝoj kiaj monometalismo al unumetalismo;
- 4<sup>a</sup>. Popolanoj nun skribiĝas per minusklo, kiel faris *Zamenhof*;
- 5<sup>a</sup>. La rezisto al la radikigo de kunmetaĵoj (depende, ktp.);
- 6<sup>a</sup>. La menciita intenco ("ke mi ege ŝpareme registris novajn vortojn") mal multe enkonduki neologismojn, tamen laŭ mi nur duone plenumita;

7<sup>a</sup>. Proponoj kiaj uzi ekz. teleparoli anstataŭ telefoni, kaj uzi nur la radikon "redakt" por ĉiuj samsignifaj derivaĵoj (redakcio, redaktoro, ktp.), konforme al la dua parto de la 15-a paragrafo;

8<sup>a</sup>. La reteno de la indikoj tr. kaj ntr., tiel ke ni povu scii, ĉu uzi aŭ ne la rilatan pasivon;

9<sup>a</sup>. La scienca parto ŝanĝatis kaj plivastigatis konsiderinde, dum pluraj neutilaj vortoj sciencaj forigatis;

10<sup>a</sup>. La utilaj ŝanĝoj en la transskribado de latin- kaj grekdevenaj vortoj;

11<sup>a</sup>. La jenkaĵena aldono de neneologisma sinonimo, ekz. labiolo = lipsono;

12<sup>a</sup>. Ke nenie uzatis la monstra "far";

13<sup>a</sup>. La forigo de pluraj arĥaikaj vortoj (vd. postan liston);

14<sup>a</sup>. Ŝanĝo de vortoj kiaj: lupino al lupeno, legacio-2 al legaciejo, magnetofono al sonbendregistrilo, marabuto al marabutejo, deŝovo al krommarĝeno, Meksikio al Meksiko, metaloïdo al nemetalo, metapsikio al parapsikologio, mezomerio al mezomero, lantano al lentano, Mikaelo al Miĥaelo, musketo al musketo.

15<sup>a</sup>. La ŝanĝo ante ne-Esperantaj PIV-vortojn al Esperantaj (Metuŝelaĥi al Metuŝelaĥo, ktp.);

16<sup>a</sup>. La aldono de tabeloj pri Matematikaj Operacioj kaj pri Matematikaj Simboloj;

17<sup>a</sup>. La gravaj aldonoj al multaj eroj, ekz. tri al "masko";

18<sup>a</sup>. La bildoj multe pliboniĝis, speciale tiuj pri botaniko kaj aliaj sciencoj; tuŝas nin la kapo de *Zamenhof* por indiki la kapajn partojn;

19<sup>a</sup>. Mi laŭdas la multajn utilajn kaj ĝustajn ŝanĝojn en la nomoj biologiaj (tiun parton de la libro mi trovas la plej bona), sed tre strangas la uzo de speciala (necesita) vorto "specio", dum oni ne uzis tiajn por aliaj dividiĝoj (familio, genrio, ordio); ankaŭ ĉi-lastaj havas ĝeneralan uzon. Evidente la botanikistoj estis eŭropaj: la malsaĝa vorto "falfolia", ĉar krom malmultaj arboj kies folioj neniam forfalas de la arboj, ekzistas du specoj de "falfoliaj": 1) tiuj kies folioj forfalas en la aŭtuno (ili nomiĝas sezoniaj arboj), kaj 2) tiuj kies folioj forfalas dum la tuta jaro (ekz. multaj specoj de aŭstraliaj eŭkaliptoj).

Aperis sufiĉe multaj novaj vortkunmetaĵoj, inter kiuj la jenaj:

Lokumi, genloko, lokaro, translokiĝo, eĥlokalizi, sunmakulo, folimakulo, kvitancmarko, fragmarko, krudmaterialo, (magnetkerna) memorilo, mesaĝanto, kunmetiĝinta, pistomiksi, rasmiksi, vinmiksaĵo, milestro, elmilo, mondmilito, minimumejo, krommisilo, us-modo, panmolo, inkmolusko, glacimonto, tablomonto, hostimontrilo, psikomovo, ampleksmova, makromova, mikromova, ventmuelilo, rungomuro, trabarmuro, filmomuziko, popmuziko, vazlavmaŝino.

En la literoj l kaj m aperis la sekvaj ±200 novaj (t.e. en PIV) neologismoj (por la tuta libro tio estas do ±2000!):

Labo, labelo, laŭrazio, leandro, leceburga, lecideo, legionelo, leguzio, lekanoro, leksemo, leksiko, leksikografo, lektino, lemoj (ĝi nun havas tri tute malsamajn signifojn: ĉu praktikema?), lentibulzario, lepado, Lepido, lepidodendro, lepidosaŭro, lepioto, leptono, leptospiro, leŭkanto, Liberurbo (ĉu nefrancoj rekonos el tio *Libreville*?), ligeo, idaro, ligroino, liĝeo, liĥeno, Lilongvo, limeo, limonio, linalolo, lipo2, lirioldendro, lisamfibioj, Lispo, listerio, litologio, litorino, litospermo (ne la spermo en la lito!), litriomo, lizino, Ljaŭningo, lizozimo, Ljubljano, lobario, loganio, likra, lolio, Lomeo, longano, Lorelejo, Lota, Luando, Lukaso, Lumbino, lumpio, Lusako, Mafio, Madano, maduko, majno, magnetoskopo, magnitudo, maĝori, Majuno, Maharastro, makerio, Makaronezio, maketo, makolio, makrobiotiko, makramo, makrofago, makrolido, makroskopa, makumbo, Malabo, malo malajalo, maleo2, Maleo3, malmio, malono, Malpigo, mabuso, mambo, Managvo, Manamo, mandorlo, mangrovo, manilkaro, marasmio, Marcialo, marelo, Marduko, maronito, martinio, krita (maso), Maseruo, Maskarenoj, Maŭritanio, Mazorio, Mazurio, Mbabano, medito, Meklenburho, Antaŭpomerio, melaleŭko, melbo, melopsitako, Mendelevo, meningokoko, menonito, mesentero, merkupto, meromorfa, merostaomoj, metadono, metafazo, metalepsa, metalongvo, metastazo, meteorito, meteoroido, metionino, metroksilo, metropoliteno, mezembrianto, mezocefalo, mezoarko, mezoŝaŭroj, mezoŝtiko, mezozooj, micelo, miceno, micet-, Mickjeviĉo, Midraŝo, midzi (penisŝuĉi), frandzi (vulvleki), migmatiko, mikobakterio, mikoplasmo, mikoten-, mikrolito, miksomikotoj, miksta(!), mileo, milenarismo, milenio, minestro, mini-, miokastoro, miroksilo, miozino, mirabilo, misgurno, miskanto(!), misterio, mitokondrio, Mistralo, mitrala, mocarelo, moderatoro, Mogadiŝo, molao, molio, Moliso, monemo(!), monodoro, monokotideloj, Montserato, monosoma, monstranco, moravo, morf-, morfio, Morgano, Morso, Moronio, mozasaŭro, mudo, muestro, mugo, mukro, multipleto, muletao, mumeo, mungo, murbo, murzo, musako, musendo, muslo, Musilo, muzo, muzikalo.

Se oni konsideras la ĉi supran liston, oni verŝajne ne rekonas naŭ dekonojn de la vortoj, kaj verŝajne neniam bezonos scii pli ol kvinono da ili. Sed vortaro volas, kaj devas, esti kompleta, por esti utila kaj fidinda. La plejmulto el la novaj vortoj estas biologiaj, speciale botanikaj, kaj la resto alisciencaj kaj ordinaraj vortoj. El la nesciencaj vortoj preskaŭ ĉiuj estas necesaj (frandzi, midzi, miksta, ktp. ktp. ktp., por kiuj oni povus uzi oficialajn kunmetaĵojn) kiel cetere la granda plejmulto el la malnova PIV transprenitaj nesciencaj vortoj. Ĉi tiuj meritas esti presitaj ege malgrandlitere, kun klara normala alternativo oficialvorta. Sed NPIV ne faris tion, kaj tiel helpas polucian lingvon. La pli inteligenta angla lingvo montras, ke por eĉ teĥ-

nikaj novaj nocioj la lingvo povas krei novajn vortojn el sia propra vortstoko.

Tamen NPIV ankaŭ malaperigis kelkajn vortojn ( $\pm 400$  en la tuta libro), multaj el ili sciencaj. Jen dekono da ili:

laktazo, laktoflavino, lazano, Lenora, Leonido, Leontina, liotropo, lipomo, logistiko, Lotofago, magnalio, maŝa, magnetostingo, masurio, pudromantelo, Maja, Matilda, Mercedeso, mesembrianto, metanalo, metano, metanolo, meteno, metila, metileno, mezotorio, miricilo, mikrobiologio, minto, mirsitato, mizomijo, monotropio, monozo, mukoproteido, mutorotacio.

### La geografia mikspoto

La plej malbona, malbonega parto de NPIV estas la geografia. Pleje kulpas pri tio la mallerta kaj ĥaosa trakto ate de la Akademio, sed la verkintoj estus povintaj uzi kaj krei Esperantecajn formojn almenaŭ tie, kie la Akademio ankoraŭ ne diktegis siajn, se ili ne dezirus ripari la Akademian fuŝaĵojn. Ili enkondukis nur unu – tre gravan – plibonigon, nome ke nomoj de landanoj komenciĝu per minusklo. Sed ili ne kuraĝis fari tion ĉie, do 2/3 havas minusklon, kaj 1/3 havas majuskulon (sed ofte ĉi lastaj nomoj estas forlasitaj, ĉu pro skrupulo?).

La plej malinteligenta decido estis, ŝanĝi en la teksto ĉiujn landnomojn for de –ujo al –io (kvankam –ujo estas preskaŭ ĉie duarange menciita ĉe la kapvortoj). Fari tion ili ne devis, kaj la decido montras gravan mankon de esperantologia klero: la neologisma sufikso –i inkluzivas 3 esceptojn al la Esperanta vortfarado, kaj krome plimalfaciligas la rekonon de nomoj por landanoj: Se Ĉilio – ĉu ĉilo aŭ ĉiliano? Se Etiopo – ĉu etiopo aŭ etiopiano? Se Indonezio – ĉu indonezo aŭ indoneziano?

Geografiaj nomoj estas preskaŭ ĉiuj (escepte de la oficialaj) neologismoj, kaj tiaj estas radikoj. La signifoj de la vortoj kiuj formas la geografiajn proprajn nomojn ne troviĝas en la novaj Esperantaj vortoj. Se "Rio" signifas rivero, "de" signifas de, kaj "Janeiro" signifas Januaro en la portugala lingvo, la nomo Rio de Janeiro ne reprezentas januaron riveron: ĝi reprezentas la urbon de Brazilo, kiu konsistas el nur unu nocio, kaj tial bezonas en Esperanto nur unu vorton de unu radikoj, nedividebla. Se la Esperantistoj volas nomi tiun urbon Januarivero, ĉi tiu vorto, propra nomo, estas unuradika neologismo hazarde simila al alia Esperanta vorto estanta kunmetaĵo de du radikoj kaj ne signifanta la urbon. Se oni volas, oni same povas nomi la urbon

Riodejaneiro aŭ Riverodejanuaro aŭ Blubabiĉo. Estas do neeble, havi interne de tia neologismo streketon aŭ apostrofojn aŭ majuskulon (streketon nur je linifino).

La unua nomo, Januarivero, similas al la Esperanta signifo de la portugala nomo; la dua nomo similas al la origina nomo; la tria nomo instruas al la Esperantistoj la signifon de tri portugalaĵoj. Kvara povus esti Riodejaneiro, por plisimiligi ĝin al la portugala ortografio. Cetere tute ne gravas, kiun novan vorton oni kreas por uzo en Esperanto. Krome la vorto reprezentas nur unu nocion, do ne povas esti plurala. Ĉiuj tiuj postuloj estas obeitaj en la vortaro jen kaj jen, kun tre multaj mikspotaj esceptoj. Konsideru la ne-Esperantaĵojn Liparoj (= Lipararo, aŭ Liparojo, aŭ Liparjo, laŭdezure), Los-Anĝeleso (= Losanĝeleso, aŭ Anĝelurbo, aŭ Laanĝelaro, ktp.), Balearoj (= Baleareso), (la regno) Marianaj Insuloj (kial mankas ilia streketo ĉi tie?) (= Mariano aŭ Marianaro), Marŝalaj Insuloj (same), Maro Morta (= Mortmaro, unu radikoj), Norda Maro (kial ne ilia streketo, kiel ĉe iliaj La-Plato kaj La-Pazo?) (= Nordmaro aŭ aŭ Norzsio aŭ Nortseo), Nigra Montaro (Ŝvarcvaldo, aŭ Nigromontaro), (sed ĝusta, verŝajne pro mia propono: Rokmontaro, Filipinoj (= Pilipinio aŭ Filipinio, aŭ Filipinujo ĉe filipino), Sunda-Insuloj (= Sundainsularo), Sudafriko (= Saŭzafriko aŭ Sudafriko aŭ, pli bone, Sudafrikio, ĉar Suda Afriko entenas plurajn regnojn).

Alia tia ne-Esperanteca polucio estas la uzo ante duoblan saman konsonanton aŭ ante vorton jam por alia nocio ekzistantan, pro manko de kuraĝo uzi ne tute similan nomon. La enloĝantoj de tiaj lokoj ne rajtas mastri nin al sia naciismo. Neniel malĝustas anstataŭ Finnlando la nomo Suomio, aŭ Finnlando kiel unu radikoj nedividebla. La samo por Irlando – irlandano. Baldaŭ oni kutimiĝos al Bonono por Bonno, kaj Kubao por Kubo, Maltao por Malto, kaj Vjeno por la franca urbo, kaj Metzoo anstataŭ Messo.

Krom la ĉi supraj mallogikaĵoj jen kelkaj pliaj strangaĵoj prigeografiaj:

1<sup>a</sup>. Kial ne macedono/-ujo por makedono/-ujo<sup>2</sup> por diferencigi kaj por internaciigi la nuntempan regnon? (Laŭleĝe en Aŭstralio oni ne rajtas uzi "Macedonio" ĉar ĝi inkluzivas la grekan parton).

2<sup>a</sup>. Pli facile rekoneblus Loiro (anstataŭ Loaro) por *Loir*, kaj Loireo (anstataŭ Luaro) por *Loire*.

3<sup>a</sup>. La malajoj loĝas ne en Oceanio, sed en la Sundainsularo de Indonezio.

4<sup>a</sup>. La Vortara –i -ismemo renversigis unu fojon: Maŭrujo sen Maŭrio.

5<sup>a</sup>. Kial Majenco anstataŭ la pli simila Majnco?

6<sup>a</sup>. En pluraj landnomoj la permesita -io + -ujo-sistemo (ĉe kapvortoj) ne plenumatis: nur -i- en ekz. Belorusio, Jugoslavio, Vjetnamio.

7<sup>a</sup>. PIV donas Lasso = Lasao, kaj Lhaso = Lasao, sed strange NPIV donas Lasao = Lasso kaj Lhaso = Lasao (ĉu estas du?).

8<sup>a</sup>. Kial ĝustaj en la singularo kaj kun minusklo la vortoj "fenico" kaj "katalaŭno", dum Lapitoj kaj Laroj?

9<sup>a</sup>. Kial Hago (= *Den Haag*) sen la artikolo, sed La-Pazo kaj La-Plato?

10<sup>a</sup>. Pri Aŭstralio ĉeestas la provincŝtatoj Tasmanio, Viktorio, Kvinlando, kaj la strangnoma Nova Sud-Kimrujo (= Njusaŭzvelso, se Kvinlando ne estas Reĝinlando). Tamen mankas Vestralio kaj Saŭstralio (Suda Aŭstralio entenas Saŭstralion, Tasmanion, Viktorion kun Melburno, kaj parton de Vestralio).

NPIV estas utila, tre utila, por kritikemaj specialistoj (ekz. tiuj kiuj specialiĝas pri teĥnikaj kaj alisciencaj aferoj, speciale botaniko), kaj por lingvistoj kiuj deziras trovi Fundamentecajn tradukojn por la centoj da nenecesaj neologismoj troveblaj en la Ido-ismema literaturo. Por ordinaraĵoj Esperantistoj sufiĉas bona nacilingva vortaro kaj Plena Vortaro. Tio ne signifas, ke NPIV ne estus bonega fonto por enciklopediaj informoj, kaj por la multaj ekzemploj de konataj verkistoj, precipe *Zamenhof*, kaj ofte por fidebla klarigo kaj vortpluformado. Ĝi estas giganta verko montranta al la ne-Esperantistoj kiom vasta Esperanto estas (kaj kiom multe pli oni devas lerni ol la vortokolekton en la lernolibroj).

Mi persone aĉetus ĝin: 1<sup>a</sup>. se mi ne havus la malnovan PIVon;

2<sup>a</sup>. se mi bezonus la novajn sciencajn nomojn, botanikajn, zoologiajn, fizikajn, ĥemiajn, teĥnikajn, kiuj ne troviĝas en mia malnova PIV;

3<sup>a</sup>. se mi ne kuraĝus (kvankam rajtus) elekti aŭ krei, laŭ mia propra gusto, la novajn kaj la ankoraŭ ne en Esperanton "tradukitajn" vortojn geografiajn (ekz. mi devis memfari por Aŭstralio, de kiu troviĝas en NPIV nur malmultaj Esperantaĵoj, multajn Esperantigojn kiaj Darvino, Alburio, Pertho, Laŭncestono, Njukastlo, Murajrivro, Kanguruinsulo, Botanibajo, Gundagajo).

#### Adreso de la aŭtoro

Marcelo LEEREVELD

12 Heather Grove

AUS - Belgrave South, VIC 3160 / AŬSTRALIO

#### Priaŭtoro informo

Instruisto ĉe Aŭstralia Somerkursaro, aŭtoro de 100-paĝa "Por ĝuste uzi Esperanton", havebla ĉe UEA. Nova eldono sub la titolo "Lingvaj resondoj por ĝuste uzi Esperanton" (200paĝa) havebla ĉe Aŭstralia Esperanto-Asocio.

## Terminologia anguleto

### *Claudius et Chloris*

Pardonu, ke mi kreis arbitran nomduopon el la romia imperiestro kaj el la helena flordiino. Ĉi tiu lasta, samkiel *Chloë*, etimologie koincidas kun *ĥloë* = juna herbo kaj *ĥloros* = flave verda aŭ verdeta. Eĉ du romiaj imperiestroj, *Constantius I* kaj *Constantius II*, havis alnomon *Chlorus*. Fine, ankaŭ la ĥemia elemento *Chlorum* ricevis sian nomon laŭ la sama koloro.

Kial mi mencias ĉion ĉi?

Ĉar en Esperanto oni tre malbonŝance oficialigis la fonetisme kaj grafisme misan nomformon "kloro". Tiu faro spitas la fontlingvon kaj la vaste internacian uzon. Dum *Claudius* restas en iuj lingvoj kun C (kp. la francan *Claude* kaj la italan *Claudio*) kaj aliaj lingvoj fonetike adaptas ĝin per K (ekz. la zamenhova *Klaŭdio* kaj la ĉeĥa *Klaudius*), *Chlorum* kutime konservas sian digramon CH, ne misformante ĝin per K: angle *chlorine*, ĉeĥe *chlór*, france *chlore*, germane *Chlor* k.t.p. Escepton prezentas la hispana *cloro* kaj same la itala. Do, Esperanto ŝajnas tute izoligi kun sia K, kiu draste eliminis kaj la fontlingvan, kaj la fundamentan fonemon Ĥ. *Zamenhof* klare konsciis, ke la ekstreme simpla fonetika sistemo de lia lingvo bezonas tiun ĉi fonemon precipe por la leksiko scienca.

En 1997 mi dokumentis, ke Ĥ en 276 mineralnomoj nepre ne cedu al K. El ili 58 nomoj enhavas la vorteron *ĥlor* (laŭalfabete ekde ceriopiroloro ĝis zonohlorito). Krome, la sama vortero ofte aperadas en la nomenklaturaj ĥemia (ekz. ĥloroformo), botanika (ekz. ĥloro), entomologia (ekz. ĥloropo), farmakologia (ekz. ĥloramfenikolo), medicina (ekz. ĥlorozo) kaj multaj aliaj.

Fronte al ĉiaj ĉi internacie establitaj terminoj apenaŭ eblas paciĝi kun la oficiala "klor" kaj riski, ke Esperanto procedu tiom diverĝe.

Do, ĉu mi esperu esti konvinkinta almenaŭ unu paciencon leganton, ke la fontlingvaj CL (*Claudius* = *Klaŭdio*) kaj CHL (*Chloris* = *Ĥlorido*) ne estas por Esperanto identigendaj fonetisme-grafisme?

Dr. Josef Kavka  
Lužná 7 – Vokovice  
CZ – 160 00 Praha 6  
ĈEĤIO